

Christian Morgenstern,
La lupfantomo

tradukita de Bertilo Wennergren

Jen lupfantom' de famili'
meznokte iam kuris for
al tombo de la profesor'.
kaj petis pri konjugaci'.

Do diktis tiu dokta ul'
starante sur la kructabul'
dum lup' senmova kiel splinto
atentis vortojn de l' mortinto.

De "lupfantomo", simpla rekta,
tra "lupfintomo", plej perfekta,
plu "lupfontomo", iom rara,
ĝis "lupfuntomo", ho, koŝmara.

Ĉi partecipoj plaĉis multe
al la fantomo, kaj rezulte
ĝi petis: "Legu plu el PIV-o
pri partecipoj en pasivo."

La viro ĉagreniĝis tamen:
"Jam fermis mi per fin' kaj amen,
ĉar netransiraj bestoj feblas
kaj la pasiv' neniam eblas."

Sed lupfantomo pri transiro
ja spertas pli ol eĉ vampiro.
La lup' revenis larmokula
al sia famili' ulula.

*Traduko de la Germana poemo "Der Werwolf"
de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Ma-
tenstelo, *1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperan-
ton de Bertilo Wennergren.*

Arg-825-1653 (2013-02-14 23:29:47)

*Vidu la retejon [http://bertilow.com/
literaturo/lupfantomo.html](http://bertilow.com/literaturo/lupfantomo.html).*

Christian Morgenstern,
Varulven

tradukita de Sven Collberg

En varulv lopp från fru m.m.
en vacker afton samt begav
sig till en bymagisters grav
och bad: "Var snäll och konjugera.

mig!" Byskolläraren stod upp
på blecknamnsskyltens mässingknopp
med svar till den, som satt på pass
med tåligt korslagd tass på tass.

"Jag var-ulv 1:a pers. i sing.,
du, han, hon, den, det var-ulv. Så
vi voro-ulv, I voren. På
de voro-ulv kom ingenting."

Varulven myste glad åt hur
pers. hade följts av sing. och plur.
"Fast", bad han, "kan det inte ges ens
en enda pers. i tempus presens?"

Bekänna måste vår magister,
att därvidlag fanns vissa brister.
En varulv sine imperfecto
var contradictio in adjecto.

Varulven satt med tårad lins.
Han visste att han fanns och finns.
Därtill kom också fru m.m.
som även måste existera.

*Traduko de la Germana poemo "Der Werwolf" de
CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo,
*1871-05-06 – †1914-03-31) en la Svedan de Sven Coll-
berg.*

Arg-825-1654 (2013-02-13 17:00:43)

*Tiu ĉi francigo troviĝas ne la reterjo [http://
bertilow.com/literaturo/lupfantomo.html#sv](http://bertilow.com/literaturo/lupfantomo.html#sv).*